# *FIHAV 2014: la plej granda komerca borso en Karibio.*



La vicprezidanto de la ministra konsilantaro de Kubo, Ricardo Cabrisas, elstarigis la grandan intereson estigitan de la Speciala Evoluzono de Mariel, kadre de la 32-a internacia foiro de Havano, kiu sukcese fini?is vendrede en Havano.

Dum la oficiala ferma ceremonio, Cabrisas esprimis ke la prezento de la dosiero pri negoceblecoj donas potencialajn ?ancojn al investaj pàrtneroj en prioritataj sektoroj por la ekonomia kaj socia progreso je meza kaj longa periodoj, kiel ekzemple la renovigeblaj energifontoj, la farmacia kaj bioteknologia industrio, minoj, manfara industrio kaj petrolo, turismo kaj aliaj.

La vicprezidento resumis la premian ceremonio kaj aldonis ke la kubaj negocistoj akiras grandan respondecon surbaze de la politikoj kaj decidoj adoptitaj rilataj al apartigo de la ?tataj funkcioj disde la entreprenaj, la transdono de plia a?tonomeco kaj ampleksigo de kompetentecoj al la socialista ?tata entrepreno, kiuj garantios mastruman scenejon pli flekseblan kaj malpli centralizitan.

En tiu ?i foiro estis premiitaj per la oraj medaloj la produktoj **Eliksiro 33**, la desegno de la rumo **Siglo** kaj la hejma kolbaso **Bravo Anonima Societo**. Aliaj kubaj entreprenoj rekonitaj estis Brascuba, Metalcuba, la telefonkompanio Etecsa, Havanaclub kaj Boga.

La ?urio de la foiro donis premiojn al la pavilonoj de Brazilo, Argentino kaj Meksiko, dum Hispanio restis kiel la lando pli reprezentita en la evento. La foiron partoprenis preska? 3 mil ekspoziciantoj de pli ol 60 landoj kaj loki?is kiel la plej granda okazinta dum la lastaj 12 jaroj.

---

https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/nacionales/38764-fihav-2014-la-plej-granda-komerca-borso-en-karibio

**Radio Habana Cuba**